

Esperanto-situacio en Srilanko post 2a instruvojaĝo de Stefano KELLER.

Esperanto Tutmonden

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-166/Radiokasedo-166-86-7-A-1032-Claude-GACOND-Esperanto-situacio-en-Srilanko-post-2a-instruvojagho-de-Stefano-KELLER-Esperanto-Tutmonden.mp3>

Cl.- Parolas Claude GACOND nome de Svisa Radio Intemacia.

Hodiaŭ mi diskutas kun Stefano KELLER, Esperanto-instruisto en Kultura Centro Esperantista, pri lia por-esperanta agado en la insulo Srilanko. Kiel vi aŭdis la pasintan semajnon, se vi havis la okazon aŭskulti nian radion, s-ro Keller raportis pri sia dua restado en Srilanko. Nun, s-ro Keller, kiel pludaŭras la por-esperanta aktiveco en Srilanko post via foriro, post tiu dua vojaĝo?

SK.- Tiam okazis kursoj kaj samtempe ankaŭ stariĝis Esperanto-Centro Srilanka. S-ro Jesudasan estas ties direktoro kaj li estas nun la motoro de la esperanto-movado en Srilanko. Estas tre ĝojige, ke kunlaboras kun li s-ro Daya Wickramasinghe, profesorino en la lingvistika departemento de la Universitato de Kelanija. Do ili kunvenas regule en Esperanto-Centro Srilanka ĉiun semajnfinojn, kaj venas ankaŭ kelkaj studentoj, kiuj estis en la kursoj.

Cl.- kaj tiu Esperanto-Centro estas io tute nova, kiu rezultis de via vojaĝo, ĉu ne?

SK.- Jes, kiel institucio ĝi estas nova, sed la konstruaĵo mem estas la renovigita domo de s-ro Jesudasan.

Cl.- Kaj ni povu nun analizi la nunan situacion, do post tiuj du vojaĝoj.

SK.- Nun ili laboras, pretigas kursojn por la informpetintoj, kiu estos en la sinhala kaj la tamila lingvoj. Estos koresponda kurso de Esperanto. Kaj pretigas la tradukon de kelkaj informiloj por la sinhala kaj la tamila lingvoj. Kaj krom tio ili sufiĉe ofte tamen ankoraŭ okazigas ekspoziciojn kaj varbas novajn lernantojn.

Cl.- Ĉu vi restas perkoresponde en kontaktoj kun tiuj homoj ?

SK.- Jes, mi estas en kontakto kun ili. Mi sufiĉe ofte ricevas nun leterojn de la lastkursaj lernantoj kaj tiujn korektinte mi resendas mian respondon al ili. Kaj krom tio mi pli kaj pli analizas la situacion kaj mi volas diri ion, kion mi deziras, ke la aŭskultantoj komprenu. Srilanko estas relative malriĉa lando. Kaj multaj aferoj signifaj realiĝas tie kun helpo de eksterlandanoj, do de registaroj, ĉu japana, ĉu brita, ĉu svisa, ĉu usona aŭ eĉ ne de registaroj, sed ankaŭ de diversaj organizaĵoj. Same ankaŭ esperanto-movado en Srilanko bezonas apogon. Ili devas vojaĝi por esti en la kurso kaj tio estas ofte sufiĉe longa vojaĝo. Kaj kiam oni venas de malproksime, oni ankaŭ malsatas kaj soifas. Kaj s-ro Jesudasan gastigas ilin. Ili ricevas manĝon kaj trinkaĵon. Kaj samtempe ankaŭ esperanto-instruadon. Kaj ĉion tion li faras senpage. Kaj por la instruado oni bezonas ilojn, instrumentojn, materialon. Do ofte li devas fotokopii ĉion, ofte li devas aĉeti ilojn, kiujn li tamen bezonas por fari la instruadon. Do fakte li multon oferas al la afero : siajn domon, tempon kaj laboron senpage kaj estas ĝojige ke ĉirkaŭas lin entuziasmoj.

Cl.- Fakte, se ni rigardas tiun ĉi agadon en Srilanko, ni konstatas, ke ĝi tre bone spegulas la problemojn, kiuj estas la problemoj de la tria mondo. Do, mondo malriĉa, ni diru kompare al Eŭropo, al Usono, mondo, kiu deziras lerni Esperanton, sed la lernado mem de la lingvo kostas lernolibrojn, materialon, kiu por ni tre ofte estas malmultekosta, sed por ili ege multekosta. Tiun ĉi problemon ni ekzamenis en La Chaux-de-Fonds, fakte en seminario dediĉita al Esperanto en la tria mondo. Dum la venontaj radioelsendoj ni havos la okazon raporti pri tiu tre grava seminario. Sed eble, s-ro Keller, vi raportu pri la konkludoj al tiu ĉi raporto.

SK.- La seminarion partoprenis spertuloj, kiuj jam agadis aŭ agadas por Esperanto en la tria mondo. Fakte, tiu nomo, 'la tria mondo' montriĝis ne tre taŭga, kaj ankaŭ 'evolulandoj', aŭ la 'suda kaj nordo', tiuj dividoj ne estas tute normalaj kaj taŭgaj por tiaj landoj, sed mi dirus, ni parolis ĉi tie pri disvastigo de Esperanto en malriĉaj landoj kaj tie, kie ankoraŭ ne ekzistas Esperanto. Kaj do partoprenis Hans Bakker el Nederlando, kiu zorgas pri Esperanto en Afriko. Krome estis aliaj spertuloj, kiel Georgo Nanovfszky de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo, kiu tute reale povis raporti al ni pri ebloj el la vidpunkto de la internacia organizaĵo ne-esperanta. Kaj ni interŝanĝis spertojn ĉar ĉeestis ne nur la agantoj, sed ankaŭ aliaj, kiuj kontaktas tiajn homojn, tiajn regionojn, kaj post la ĝenerala spertinterŝanĝo, ni pretigis kadran planon por venontaj agadoj en la tielnomata 'tria mondo', aŭ entute por Esperanto. En tio kunlaboris ankaŭ Derek Roff el Usono, kiu multe vojaĝis kaj kontaktis tiujn regionojn.

Cl.- Kaj kio estas tiu plano, eble vi diru kelkajn vortojn.

SK.- Estas kvar punktoj. Do, la unua estas : elekto de lando aŭ regiono, kie oni volas disvastigi Esperanton, kaj tuj al tiu kroĉiĝas, ligiĝas la subpunkto : analizado de la lokaj influfaktoroj. Ĉar estas diversaj etnoj, lingvoj, politikaj kaj aliaj ebloj tie. La dua punkto estas la poresperanta agado al, el kaj en la lando, kiun ni elektis. La tria punkto estas utiligo de Esperanto en la lando, al la lando kaj el la lando. Kaj la kvara estas la registrado de ĉiuj spertoj dum la tuta agado kaj finfine tio ebligas analizon kaj adaptadon al nova agado. Kaj la plej grava punkto, kiu nun estas nia ĉefa zorgo : utiligo de Esperanto. Ĉar tamen ni alportas Esperanton ne nur tial, ke ili lernu unu lingvon pli.

Cl.- Kiam vi diras, elekto de lando, tio ne signifas, ke oni elektas nur unu landon en la mondo, ĉu ne ?

SK.- Ne, tute ne, sed ni ekzamenas ĉiujn lokojn, kien ni nun deziras iri unu post la alia.

Cl.- Kaj tiam faras la analizon por ĉiu el tiuj landoj.

SK.- Jes.

Cl.- Kaj vi havas do projektojn, ĉu ne ?

SK.- Jes, decidiĝis regula okazigo de tiaj seminarioj, do entute pri disvastigo de Esperanto.

Cl.- La venonta okazos...

SK.- ...en majo, je pentekosto en tiu ĉi jaro. 17-18-19-ajn de majo estos tiu ĉi seminario kun la titolo 'Esperanto tutmonden'.

Cl.- Eble diru kelkajn vortojn pri la programo de tiu pentekosta renkontiĝo.

SK.- Unue ni resumos la rezultojn de la unua seminario, kaj poste ni deziras pritrakti pozitivajn spertojn, ni volas kontakti homojn, kiuj havis konstruajn, pozitivajn spertojn en tiaj agadoj, kaj en tiuj raportoj ni analizos la situacion laŭ la unua punkto de la plano: elekto de lando, kaj analizado de la lokaj influfaktoroj. Post tio ni iom agados por Srilanko, ankaŭ seminare. Do ni aŭskultos raporton pri okazintaĵoj, pri la lokaj influfaktoroj kaj ni pretigos planojn por la jaroj 1986 kaj 1987, kaj ni kreos agadgrupon. Post tio, en la kvara punkto ni pritraktos la eblon de partopreno de esperantaj kaj ne-esperantaj instancoj, organizaĵoj en la agadoj, kiuj estas ekzemple Kultura Centro Esperantista, Svisa Esperanto-Societo, Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, ILEI, IEI, UEA kaj tiel plu.

Cl.- Kaj Unesko, eble...

SK.- ... jes, kaj Unesko, kiel ne-esperanta instanco, organizaĵo, kaj ĝenerale kaj konkrete kiel ili povos partopreni en la planoj. Kaj finfine ni pretigos dokumenton kaj ni subskribos engaĝiĝojn, do ni esperas tre viglan laborkunsidon tie.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond parolis kun Stefano Keller pri la por-esperanta laboro en la insulo Srilanko. Ĝis reaŭdo!